

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig Lazarus  
Zamenhof*

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold Elb*

Heinrich Heine,  
Lurleia

*tradukita de N. N. 01*

*Tiu traduko estas poste iom modi-  
fita de aliuloj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leopold Elb.*

Ne scias mi, kial subita  
malgaj' en la koro naskiĝis;  
el tempo jam enterigita  
legendo al mi reviviĝis.

Jam malvarmetiĝas l' aero,  
la Rejno mallaŭte babilas,  
per oro de l'sun' en vespero  
la supro de l' monto rebrilas.

Plej belan knabinon mi vidas:  
en ora ornamo brilante,  
sur supro de l' monto ŝi sidas,  
la harojn mistere kombante.

La oran kombilon ŝi movas  
kaj kantas tra l' pura aero,  
kaj forto mirinda sin trovas  
en tiu ĉi kant' de l'vespero.

Ŝipet' iras sur la rivero,  
ŝipisto ekstremis de l' kanto,  
kaj blinda por ĉiu danĝero  
rigardas li al la kantanto.

Ha, baldaŭ ŝipisto la bela  
perdiĝis sub l' akvoturnado;  
ĝin Lorelej' faris kruela,  
per sia mirinda kantado.

...

Ne scias mi, kial mi estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia memor'.

Vespero jam ekmalheliĝas,  
Fluadas la Rejn' en trankvil',  
La supro de l' monto lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Belega knabino jen tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kronas  
Mirinde la ora harar'.

Ŝi uzas kombilon el oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Kaj sopiregon eksentas  
Ŝipisto dum sia vetur';  
Rifaron li ne priatentas,  
Al monto rigardas li nur.

Mi kredas, ke dronos finfine  
Ŝipisto kun sia boat',  
Kaj tion kaŭzis feine  
La Loreleja kantad'.

...

Ignoro, quid id sibi velit,  
Tristissimus cur sim,  
Antiqui aevi fabellam  
Cur saepe volverim.

Vesperascit et frigescit,  
Et Rhenus leniter it,  
Cacumen montis lucescit,  
Dum Phoebus occidit.

Sedet in summo montis  
Virgo pulcherrima,  
Auro nitet gemma frontis,  
Se pectit auricoma.

Aureolo pectine pectit,  
Carmen canens procul,  
Mirandum id habet modum  
Nec non virilem simul.

In cymba navitam mille  
Angores feri tenent,  
Non videt scopulos ille,  
Ocli non si sursum vident.

Opinor undas devorare  
Nautam cum navicula,  
Effecit solo canendo  
Lurleia id dea.

...

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).*

*Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)*

*Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mv.ru/Kolekto/Lorelej.html>.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).*

*Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)*

*La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.*

*Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en la Latinan de N. N. 01.*

*Arg-2-179  
14:00:52)*

*(2010-02-11*